

Bulgara **ESPERANTISTO**



1967

	Paĝo
Ĉefartikolo. Nia plej granda nacia festotago (Iv. Sarafov)	1
G. Serebrjakova. La unua	2
N. A. MEM-kunsido	4
* * * Literatura konkurso	5
VI. Majakovskij. Versaĵoj pri soveta pasporto	6
Dora Beneva Naĉeva. Loveĉ	7

ORGANIZA VIVO

Veselin Dilov, Ivan Daskalov, Anĉo Anĉev, Veselin Dimitrov, Coĉo Kolarov	8
Cv. Petrova. Unua landa konferenco	10
Ih.A. Mollinger. La eraroj en nia spirado kaj ties malutilaj sekvoj en nia sanstato	11
Penka Petrova. Pri la tempo kaj la homo	12
[Ĥr. Stamboliev], Iv. Kotov, D. Ivanov, VI. Georgiev. El la historio de E-movado en Ruse	13
L. L. Zamenhof. Pri la propono por „homo“	16

Kovrilpaĝo: Monumento en Miĥajiovgrad de la pereintoj en la unua kontraŭfaŝisma ribelo en la mondo en Septembro 1923.

Abonkotizo: jara — 1,40 levoj, duonjara—0,70 lv. Por eksterlando—2 lv. 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro: por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio—1,50 lv. Por Italio—1000 liroj. Aparta numero—0,14 lv. Reklamatarifo: 0,15 levo por cm²; sur tuta kovrilpaĝo—80 lv.; korespondanoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj—publikigitaj senpage.

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, R. Kongresi Permetit 7—II/10, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 2 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, Mitnaja ul. 52/54 kv. 19, Moskva, B—162.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 10—a.



NIA PLEJ GRANDA NACIA FESTOTAGO

*La bulgara popolo suferis proksimume 500 jarojn sub neimagebla jugo de la turkaj sultanoj kaj feŭduloj (1393—1878). Tio treege malhelpis la historian evoluon de nia lando. Ĝi ne povis libere disvolviĝi en la sferoj de la ekonomio kaj la kulturo. Vere, la bulgaroj estis progresemaj kaj sciamaj. Jam en la unua duono de la XIX-a jarcento ili komencis streĉe labori por sia klerigado por atingi rapide la kulturnivelon de la eŭropaj popoloj kaj ankaŭ tiun de siaj kunfratoj — la slavoĵoj. Tamen, en tiu grava streĉa laboro ili renkontis konstante malhelpojn kaj diversajn embarasojn ne nur fare de siaj regantoj — la turkoj, sed ankaŭ de la grekoj kaj ne malofte de iuj siaj samnacionoj. La tiamaj bulgaraj riĉuloj, nomataj ĉorbaĝioj, preferis kunlabori kun la turkaj regantoj, por tiamaniere garantii nur sian propran sekurecon, prosperon kaj trankvilan ekzistadon. Sed la cetera plimulto de la popolo (vilaĝanoj, metiistoj, laboristoj kaj inteligentuloj) tute ne povis toleri tiun situacion de sklaveco kaj ili ĉiuj komencis sin prepari por la liberiga nacia revolucio. Fondinto de tiu revolucia kampanjo estis **Georgi Sava Rakovski** (1821—1867). Oni fondis en Rumanio Centran Revolucionan Komitaton, kies ĉefa tasko estis la politika liberigo de Bulgario. Gvidantoj de tiu komitato estis **Luben Karavelov** (1837—1879), **Vasil Levski** (1837—1873), **Hristo Botev** (1848—1876). La 20-an de aprilo 1876 oni proklamis la Aprilan Ribelon kun centro urbo Panagjuriŝte.*

Post la kruela frakaso de la Aprila Ribelo venis la Liberiga Rusa-Turka Milito (1877—1878), kies konsekvenco estis la kreo de sendependa bulgara ŝtato kun ĉefurbo Sofia. Bedaŭrinde, tiu ĉi nova ŝtato ne estis proklamita kiel popola respubliko, kiel revis tion Levski, Botev, Benkovski kaj multaj aliaj revoluciuloj, sed kiel princlando, kiu disvolviĝadis laŭ kapitalisma vojo, kiu poste transformiĝis en faŝisman diktaturon. La tiamaj bulgaraj ŝaŝistoj estis ligitaj kun la germanoj kaj italaj ŝaŝistoj, pro la regado de princo kaj poste de caro Ferdinand kaj lia filo Boris III — ambaŭ laŭ origino germanoj. La faŝistoj komencis kruele kaj senindulge persekutadi la honestajn patriotojn bulgaroj kaj en tiu batalo pereis multaj herooj, inter kiuj ankaŭ multaj bulgaraj esperantistoj.

*La 17-an de julio 1942 la gvidantoj de la bulgara kontraŭfaŝisma movado **Georgi Dimitrov** kaj **Vasil Kolarov** fondis la patriotisman organizacion „Oteĉestven Front“ (Patrianda Fronto), kiu unuigis sub sia standardo ĉiujn patriotojn — la fidelajn gefilojn de nia brava popolo. La 25-an datrevenon de tiu fondiĝo ni celebris solene antaŭ nelonge. Rezulte de la intensa aktiveco de tiu organizacio kaj per la decidiga helpo de la glora Ruĝa Armeo de Sovetunio, je la 9-a de septembro 1944 la bulgara popolo estis liberigita kaj la*

regpotencon prenis en siaj manoj la laboristoj, la kamparanoj kaj la inteligentularo. La ŝtato estis proklamita kiel Popola Respubliko kaj ĝia evoluado ekiris laŭ socialisma vojo. Ĝi rapide disvolvas siajn agrikulturon kaj industrion. Nun Bulgario ne plu estas postrestinta lando, sed moderna ŝtato kun socialisma grandbiena agrikulturo kaj kun fortaj peza kaj malpeza industrioj. Nia lando konsistigas parton de la potenca socialisma tendaro kaj kunhelpas por la progreso de la neevoluintaj landoj, kontribuante kune kun la ceteraj socialismaj ŝtatoj por la sekureco de la popoloj en la mondo.

Pro tio la 9-a de Septembro estas por ni neforgesebla dato kaj plej granda nacia festotago, en kiu fiere kaj impone manifestacias ĉiuj bulgaroj, inkluzive la bulgarajn esperantistojn kaj ankaŭ ili majeste flirtigas la naciajn, ĉielbluajn kaj verdajn standardojn en ĉiuj urboj kaj vilaĝoj de nia amata Socialisma Popola Respubliko Bulgario.

LA UNUA

de G. Serebrjakova

La laboristoj sin armis kaj estis pretaj por forpuŝi la atakantajn kontraŭ-revoluciulojn. La estraro de la Kieva Komsomolo kunvokis nin ĉiutage por militekzercoj. Ni aspiris heroaĵon en la nomo de la ideo.

En la cirka konstruaĵo, dronanta en krepusko, saturita perodoro de ĉevala ŝvito, sterko kaj mucido, kolektiĝis antaŭ la foriro al la fronto ruĝarmeanoj, laboristoj kaj komsomolanoj. Tiun kunvenon ĉeestis ankaŭ mi. Ni sciis, ke parolos iu el la membroj de la Ukraina registaro.

Jen sur la podiumon venis svelta kaj delikata virino en blua robo kaj kun granda pajla ĉapelo surkape. Delikata travidebla vualo ĉirkaŭis la ĉapelon kaj neglekte pendis. Per facila movo la virino demetis sian ĉapelon kaj metis ĝin sur la tablon, ekskuis sian blondan, krispan hararon kaj ekparolis. La ruĝarmeanoj rigardis ŝin surprizite kaj malfideme: — Kiu estas tiu virino?!

— Ukraina komisaro pri agitado kaj propagando, Kolontaj — aŭdis mi ies voĉon.

Nor post kelkaj minutoj la cirko si-

lentiĝis kaj ĉiuj ĉeestantoj, kvazaŭ kaptitaj, ekaŭskultis la neordinaran oratoron. Ŝi havis fortan voĉon, artistan dikcion, saĝajn kaj kompreneblajn vortojn — do la forto de ŝia oratora efiko estis magia.

Mia imago pentris Kolontaj kiel ruĝa Ĵana d' Ark (Jeanne d' Arc). Ŝi parolis pri la nepra venko super la malamiko de la soveta reĝimo, pri la tero, kiun ricevos la vilaĝanoj, pri la feliĉa estonteco de la laboruloj. Estonteco belega, kia neniam ekzistis ĝis nun sur la tero. Mi rigardis en la okulojn de armeanoj, kiuj staris apud mi: en iliaj okuloj mi vidis lumon venantan el la profundo de la animo.

Kolontaj trovis la ĉefajon, kion oni postulas de oratoro — la ŝlosilon al la homaj koroj.

Kiam ŝi finis sian paroladon sub la kupolo de la malnova cirko eksplodis aplaŭdoj kaj ĉiuj ĉeestantoj direktiĝis al la konstruaĵo, kie troviĝis la gubernia komitato de la Partio. Ĉe la frunto de la kolono iris Aleksandra Kolontaj, kaj la somera vento facile flirtigis la vualon de ŝia larĝa ĉapelo, simila al

ombrelo.

Post kelka tempo mi, kune kun aliaj komsomolaninoj, vizitis Kolontaj. Tiam mi unuan fojon en mia vivo aŭdis de ŝi pri Teroan djo Merikur (Theroan de Mericour), pri Luiza Miŝel (Luiza Michel) kaj aliaj virinoj kies nomojn registris la historio de la homaj bataloj por libero. Mi mem ne kuraĝis ekparoli kaj akre suferis pro la konscio de mia profaneco. Kiom multe mi devas studi por proksimiĝi al la konoj de tiu virino. Ĉe unu el niaj sekvantaj renkontoj kun Kolontaj, ŝi rekomendis al ni tralegi iujn librojn kaj artikolojn, inter kiuj: „La virino kaj la socialismo“ de A. Bebel, la artikolojn de Klara Cetkin (Clara Zetkin), Ivesa Arman (Ivesa Armand) kaj Roza Ljuksemburg (Rosa Luxemburg). Tamen pro iuj cirkonstancoj mi povis tralegi la rekomenditajn librojn kaj artikolojn nur en 1921 jaro. Tiam A. Kolontaj laboris en la Virina Sekcio de CK en Moskvo. Ŝiaj paroladoj en kunvenoj kaj la artikoloj en ĵurnaloj estas por ĉiam gravuritaj en mia memoro kaj ili donis al mi impulson por studi la historion de la feminismo.

— Miloĵ da jaroj — parolis A. Kolontaj — la virino estis devigata plenumi humiligan kaj pezan laboron aŭ resti en plena mizero. Senigita je kiaj ajn rajtoj, eĉ kiam ŝi apartenis al la privilegiitaj klasoj, ŝi neeviteble postrestis en sia krea evoluo kompare kun la viro. La kuirejo, la familio kaj la eklezio — jen la konata triangulo kiun la burĝaro destinis por nia virina aktiveco. . . Kiom da talentoj kaj kvalitoj pereis en tiu ensorĉita rondo kaj senelira triangulo?!

La problemoj pri la virina egalrajteco ĉiam profunde emociis A. Kolontaj.

— Ne sufiĉas por la virino havi ĉiujn rajtojn, necesas ke ŝi spirite atingu la viron, paŝi paralele kun li — ripetis ŝi ofte. La soveta reĝimo efektivas la revojn de la virino, sed la akiritaj rajtoj ankaŭ devigas nin.

En la komenco de la dua jardeko

mi havis eblon esti kune kun A. Kolontaj sufiĉe ofte. Ŝi ne toleris senagadon. Tamen, pri kio ajn ŝi okupiĝis, ŝi neniam forgesis bonaranĝi sian hararon, zorgi pri sia haŭto. Ŝi ĉiam zorgis pri sia ekstera aspekto kaj en ŝia aspekto ĉiam estis videbla io freŝa, io bela.

— Nek la viro, nek la virino rajtas neglekti sian eksterajn, la okupateco ne pravigas la neglekton pri vestoj kaj eksterajo — diradis Kolontaj. Foje A. Kolontaj donis al mi volumon de Nitĉe (Nitsche) kaj diris: — Ĵus mi trafolumis la verkon de tiu pesimisma aŭguristo. Li, same kiel la pseŭdo-filozofo Vajninger (Weininger) estas virinmalamanto ĝis ŝaĝoperdo. Jen aforismo de li: „Kion oni povas renkonti malpli ofte ol virinon, kiu ne scias, kion signifas scienco?“ Tiu aforismo rememorigas al mi pri iu germana sciencisto, kiu esploris la homan cerbon. Li asertis, ke la cerbo de virino pezas malpli ol tiu de la viro. Per tio li provis pruvi la nekapablecon de la virinoj pensi kaj krei. Sed kiam tiu viro mortis oni mezuris lian cerbon kaj evidentiĝis, ke ĝi pezas malpli ol tiu de virino.

Enirinte la kabineton de Kolontaj mi tuj devis komenci labori.

— Jen estas por vi libroj, notkajero, komfortigu vin kaj ni ne malhelpu unu al la alia, ĉiam proponis al mi Kolontaj, kiam ŝi estis okupita. En daŭro de kelkaj horoj ni silente laboris.

Foje ŝi invitis min ĉeesti renkontiĝon kun eksterlandaj delegitoj, alvenintaj por kongreso de Kominterno (Komunista Internacio). Unue parolis itala komunisto. Sian parolon li finis per la kanto „Bandera rossa“. Interpretis en rusan lingvon Kolontaj. Poste parolis anglo kaj ree tradukis ŝi.

A. Kolontaj interpretis ankaŭ la paroladon de la svedo kaj de la franco. Ŝi estis rara poligloto kaj perfekte posedis multajn fremdajn lingvojn.

En 1923 ŝi forveturis por labori en eksterlando. Kiel unua sovetia virino

ambasadoro ŝi ĝuis la grandan estimon kaj havis neordinaran influon en la landoj kie ŝi oficis. Jam dum sia elmiĝado ŝi loĝis en Danio kaj Norvegio. En urbon Oslo ŝi denove iris, jam kiel ambasadoro de Sovetunio. La vastaj konoj, takto, ĉarmo kaj komprenemo, kiuj radiis el la personeco de tiu saĝa kaj volforta virino kreis por ŝi grandan aŭtoritaton. Kun brila sukceso ŝi prelegis en la skandinavaj universitatoj kaj per tio alte levis la prestiĝon de la ŝtato, kiun ŝi reprezentis.

Lastan fojon mi renkontis Kolontaj en 1935. Tiam ŝi estis jam 63-jara. Ĉe

tiu nia renkontiĝo, pro mia peto, ŝi interalie rakontis al mi pri siaj multnombraj vojaĝoj tra Eŭropo kaj Meksikio, pri sia juneco en la nobela familio, kiel ŝi forlasis tiun familion, kelkajn epizodojn el sia eksterleĝa agado, pri sia kontakto kaj korespondado kun Lenin ktp.

Parolante pri sia persona vivo ŝi menciis, ke ŝi kaj ŝia edzo — Pavel Dibenko estis la unua paro, kiun oni registris en la civila edziĝregistro de Sovetunio.

Tradukis: *Paska Noeva*

MEM—KUNSIDO

En Sofio okazis renkontiĝo de respondecaj MEM-agantoj por pritrakti dum du tagoj (21—22 de junio) organizajn kaj aliajn problemojn de la agado de MEM.



Parto de la partoprenintoj en la kunsido

Partoprenis: W. Gilbert (Francio), centra redaktoro de „Paco“, Tomaŝ Balda (ĈSSR), sekretario de MEM, S. N. Podkaminer (USSR), prezidanto de Komisiono por internaciaj ligoj de MEM, Br. Krautforst, membro de Internacia virina komisiono de MEM,

T. Lakova (Bulgario), vicprezidentino de MEM, H. Fuchs (GDR), membro de IK de MEM, N. Aleksiev (Bulgario), prezidanto de MEM. Krom la cititaj MEM-estraranoj ĉeestis la membroj de Bulgara MEM-Komitato kaj estraranoj de BEA.

La kunsidoj pasis en tre amika atmosfero kaj granda aktiveco.

Protokolis T. Balda.

La kunvenintoj akceptis du rezoluciojn (pri Proksima Oriento kaj pri Vjetnamio), mesaĝon al la japana amasa pacmovado „Kontraŭ A kaj H-bomboj“ kaj salutleteron al la veterano de MEM A. Balague, kiu ne povis partopreni la kunsidon. Ili estas publikigitaj en la № 72 de „Pacaktivulo“.

Lige kun la renkontiĝo estis organizita tuturba esperantista kunveno kun oratoroj el ĉiuj reprezentitaj landoj. La rezolucio de la kunveno ankaŭ estas publikigita en „Pacaktivulo“.

Escepte de k-do Fuchs, kiu revenis al sia lando tuj post la fino de la kunsidoj, ĉiuj ceteraj eksterlandanoj akom-



panitaj de la prezidanto de MEM faris ekskursan vojaĝon tra Bulgario kaj havis multajn renkontigojn kun esperantistoj en diversaj urboj.

En konvena formo post la finpreparo de la protokolo estos informitaj la aktivuloj de MEM pri la decidoj de la renkontigo.

La partoprenintoj en la renkontigo estis speciale salutitaj per amika alparolo flanke de la vicprezidanto de Bul-

gara Nacia Pacdefenda Komitato k-do Georgi Piriński, membro de la Tutmonda Packonsilantaro. Oni varme akceptis liajn bondezirojn por sukcesa laboro de MEM.

Respondis je la nomo de la ĉeestantoj k-do W. Gilbert, kiu dankis al Nacia Pacdefenda Komitato por ĝia varmarilato kaj subteno al la agado de MEM.

N. A.

LITERATURA KONKURSO

Pro la bonaj rezultoj ricevataj de la Literatura Konkurso anoncita en la januara numero 1965 jaro de „Bulgara Esperantisto“ kaj honore al la 50-a datreveno de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio, 90-a datreveno de la liberigo de Bulgario, 60-datreveno de la fondiĝo de Bulgara Esperantista Asocio, 80-a datreveno de la kreo de Esperanto CK de BEA decidis organizi novan Literaturan Konkurson.

En la konkurso povas partopreni ĉiuj bulgaraj esperantistoj.

Temaro (pri ĉiuj ĝenroj): Konstruado de la nova vivo, herooj de la laboro, bulgara-soveta amikeco, batalo por paco, naturaj kaj turismaj belaĵoj, la naciliberiga movado, la batalo kontraŭ la koloniismo, neokoloniismo kaj imperiismo, la kontraŭfaŝisma batalo.

La nombro de la verkoj ne estas limigita.

La limtempo por la prezentado de la pretaj materialoj estas 31. XII. 1967.

La rezultoj de la konkurso estos anoncitaj en la asocia organo. La premiitaj verkoj estos sinsekve publikigitaj en „Bulgara Esperantisto“.

La Estraro de CK de BEA rekomencos la sukcesintojn en la konkurso laŭ la jena tabelo:

I. Por originalaj versaĵoj en Esperanto:

1-a premio — 25 lv.

2-a „ — 20 lv.

3-a „ — 15 lv.

kaj 3 kuraĝigaj rekompencoj po 10 lv.

II. Por originalaj rakontoj en Esperanto:

1-a premio — 25 lv.

2-a „ — 20 lv.

3-a „ — 15 lv.

kaj 3 kuraĝigaj rekompencoj po 10 lv.

III. Por esperantlingvaj tradukoj de versaĵoj de la klasikaj kaj nuntempaj bulgaraj verkistoj:

1-a premio — 20 lv.

2-a „ — 15 lv.

3-a „ — 10 lv.

kaj 3 kuraĝigaj rekompencoj po 5 lv.

IV. Por esperantlingvaj tradukoj de mallongaj rakontoj el la verkoj de la klasikaj kaj nuntempaj bulgaraj verkistoj:

1-a premio — 20 lv.

2-a „ — 15 lv.

3-a „ — 10 lv.

kaj 3 kuraĝigaj rekompencoj po 5 lv.

La konkurso estas sekreta. La manuskriptoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. La saman pseŭdonimon oni skribu sur fermita koverto, en kiu estu antaŭe metita papero, subskribita per la vera nomo de la aŭtoro kaj ties adreso. La materialojn, kune kun la fermita koverto oni metu en alian koverton, ankaŭ subskribitan per la sama pseŭdonimo kaj oni adresu ĝin al la adreso de la Asocio, P. K. 66, Sofio.

VERSAĴOJ PRI SOVETA PASPORTO

de Vladimir Majakovskij

Mi lupe
ekstermus
burokratismon.

Mi respektas
mandaton nenian.

Al ajnaj
diabloj
sen kompromiso
flugu ajn-dokumento,
krom tiu. . .

Laŭ longa front'
de kupe-
-lini'

oficisto
gentilas
kulture.

Oni donas pasportojn
kaj donas
mi

mian
libreton purpuran.

Al unuj pasportoj —
respekta ridet'.

Al aliaj —
rilato malbona.

Respekton,
ekzemple, naskas
bilet'

kun larĝega
angla leono.

Okule platante
al „onklo bona“,
kun senĉes-riverenca
saluto

Ili prenas,
kvazaŭ ĝi estas
trink-mono,

amerikan pasporton
valutan.

Al pola —
rigard'
sen kompren'.

Al pola pasporto —
stulta mien'

sur
policista
vizaĝo — :

— jen kia
nun estas
nova problem' —
geografia novaĵo.

Kaj ne turnante
kapon-brasikon,

simple
kun teda
oscedo,
li prenas
danajn pasportojn
maldikajn
kaj de diversaj
ceteraj
svedoj.

Sublte,
kvazaŭ
per broga
pun',

kripliĝis
vizaĝo
lia.

La sinjor' oficisto
prenas nun
ruĝhaŭtan

pasporton
mian.

Li prenas ĝin,
kvazaŭ
ĝi estas
bomb',

aŭ erinac',
aŭ razila lamen'o,

aŭ serpent'
kun dumetra long'

kaj dudek
pikiloj
venenaj.

Okul-signis
valizo-portist'
kun signif' —

li portus
senpage
mian pakajon.

Ĝendarmo
rigardas
al detektiv',

la detektiv' —
al ĝendarma
vizaĝo.

Ho, kiom plezure
ĝendarma kruel'

min krucumus
kaj vipus ĝis morto
pro tio

ke havas mi
kun martel'

kun rikoltilo
sovetan pasporton.

Mi lupe
ekstermus



Mi respektas
 mandaton nenian.
 Al ajnaj diabloj
 sen kompromiso
 flugu ajn-dokumento.
 krom tiu. . .
 Eltiras
 el larĝa
 poŝ'
 mia man'

varon,
 valoran
 pli
 ol io.
 Legu,
 enŭiu —
 estas mi
 civitan'
 de Soveta Unio.

Tradukis : S. Rublov

LOVEĈ

de Dora Beneva Naĉeva

Mi vin salutas nun, ho naskiĝurbo mia,
 unika loko kun fabela ĉarm' varia!
 Ĉardeno ekflorinta ĉe l' Balkanmontar' giganta,
 dronanta en tilioj kaj siringoj ridetantaj,
 mi kore vin salutas, naskiĝloko mia!
 Saluton varman ankaŭ de infanoj viaj,
 translokiĝintaj en diversajn partojn de la Tero,
 kaj kiuj — simplaj aŭ elstaraj — ĉiuj kun fiero
 pri vi memoras ĉiam,
 forgesas vin neniam
 dum siaj ĉiutagaj luktoj, ĝojoj kaj malĝojoj
 kaj ili ĉiun fojon
 pri vi nur pensas kun inspiro,
 profunda amo kaj admiro. . .
 Kaj havis ili ja
 komprenon klaran,
 ke kiam prujno kovros nepre la hararon,
 al vi revenos ĉiuj kaj vin kara sentos. . .
 Kaj la gepatra domo ilin jam atendos:
 Malfermos sin la stratpordegoj kun ornamferaĵoj
 kaj kun la buks' maljuna plantita dum junaĝo,
 en la silenta korto la betuloj blankaj kaj graciaj
 svingante ilin bonvenigos per branĉkapoj siaj!
 Kaj la rivero Osâm ree tiam
 en song' al ili flustros, kiel iam,
 pri l' multaj gloraj heroaĵoj de iliaj avoj —
 pri tiuj, kiuj por la liberigo de la sklavoj
 oferis plej kuraĝe sian vivon en bataloj
 kaj testamentis al idaro sia
 — grandajn idealojn.

Tradukis : Simeon M. Simeonov

BULGARA GAZETARO INFORMAS PRI MEM

Pri la okazinta renkontiĝo de MEM-
 aktivuloj en Sofio raportis ĉiuj gran-
 daj bulgaraj ĉiutagaj gazetoj, citante
 la familiajn nomojn de la eksterlandaj
 partoprenintoj. Radio Sofia ankaŭ
 raportis kelkfoje.

Same oni agis rilate la tuturban espe-

rantistan kunvenon omaĝe al la MEM-
 aktivuloj.

Oni sciigis ankaŭ pri la protestletero
 al usona prezidanto kontraŭ la agreso
 en Vjetnamio kaj pri aliaj dokumentoj
 de MEM.



MEZDRA. La klubejo de la Sindikata Organizaĵo, kie ni lernis Esperanton dum la tuta jaro kaj ni sentis nin kiel en nia hejmo, estis plibeligita. Sur la tablo estis kroĉita portreto de D-ro Zamenhof kaj verda esperanta flageto. Estis en la fino de la lernoĵaro — en nia kurso de Esperanto por komencantaj civitanoj. La kursgvidantino k-dino Radka St. Dilova raportis: „Ni havis 32 okupojn, lernis 26 lecionojn kaj faris ripetadon. Post la lecionoj ni legis legaĵojn kaj tradukis ilin kolektive lernis kantojn „La printempo“, „Pola popola kanto“, „Edelvejso“ kaj „Lili“. Nia grupo vizitis la VIII-an festivalon de la Bulgara Esperanto-Junularo en Kazanlâk. Ni partoprenis en la speciala solena vespero, per kiu la E-societo „N. J. Vapcarov“ omaĝis D-ron Zamenhof okaze de la 107 datreveno de lia naskiĝo. Okaze de la festotago de Kiril kaj Metodij k-do Anĉev prelegis pri ilia vivo kaj verko. Plej regule vizitis la kurson kaj lernis diligente Esperanton la gekamaradoj Genka Jotova, Gerasim Iliev, Cvetan Kojuharov, Ivanĉo Toŝkov, Veselin Dilov, Georgi Todorov, Ŝtârbov k. a.

Ni estu bonaj homoj kaj batalantoj por paco kaj amikeco inter la popoloj! Vivu la lingvo Esperanto!“

Post la raporto sekvis kantoj, recitaĵoj de „La Vojo“, „Nia Druĵevo-tendar“, „Por memoro“. Deklamis Veselin Dimitrov, Radka Pravĉanska k. a. Poste sekvis dancoj. Ni aŭskultis la unuan en Bulgario E-gramofondiskon kun kantoj, plenumitaj de Miŝo Zdravev.

Veselin Dilov

E-societo „Nikola Vapcarov“ disvol-



Parto de la junaj esperantistinoj

vas aktivan agadon. En ĝi membras 45 personoj. Krom tio dum la lernoĵaro 1966/1967 oni malfermis kurson en kiu enskribiĝis 35 lernantinoj de la profesia teknika lernejo. La kurso kun kursgvidanto Anĉo Anĉev funkcias regule. Parto de la lernantinoj partoprenis en la VIII Festivalo de la Bulgara E-Junularo en Kazanlâk — aprilo ĉ. j.

La kursaninoj manifestaciis en apartaj kolonoj kun sloganoj kaj afiŝoj je la 24-a de majo — festotago de la bulgara kulturo kaj slava skribo.

Teksto kaj foto: *Ivan Daskalov*

Продължава се подписката за събиране абонати за сп. „Булгара Esperantisto“.

Отчитайте редовно събрания членски внос.

Сумите изпращайте до съюзната канцелария, София, п. к. 66,



ELSTARAJ ESPERANTISTOJ-PACBATALANTOJ GASTIS EN MEZDRA

Gastoj al la esperantistoj en Mezdra estis elstaraj reprezentantoj de la Mondpaca Esperantista Movado (MEM), kiuj kunsidis antaŭ nelonge en Sofio: Prof. Semjon Podkaminer, prezidanto de la Komisiono pri Internaciaj Ligoj ĉe MEM kaj membro de la Leningrada Komitato por defendo de la paco, Tomaŝ Balda, sekretario de MEM kaj membro de la Ĉeĥoslovakia Nacia Komitato por defendo de la paco, William Gilbert el Francio, ĉefredaktoro de revuo „Paco“, Bronja Krautforst el Pollando, respondeculino pri laboro kun la virinoj.

La gastoj estis akompanataj de Nikola Aleksiev, prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio kaj de Mondpaca Esperantista Movado kun sidejo en Sofio.

La programo antaŭvidis tre mallongan haltadon de la grupo en Mezdra. Pro tio esperantistoj el la urbo kune kun la prezidanto de la Urba Popola Konsilantaro inĝeniero Ljubomir Jotov atendis la grupon kun florbukedoj en la manoj. Sed ĉu en daŭro de kelkaj minutoj la homoj povas interkonatiĝi, ĉu

ili havus eblecon diri al si kiom kara kaj dezirinda estas por ĉiuj homoj la paco, ĉu oni povus esprimi la decidemon defendi la pacon? Rompinte la antaŭviditan planon la gastoj restis kelkajn horojn. Belaj, neforgeseblaj horoj. Unua salutis la gastojn la prezidanto de la Konsilantaro inĝ. Jotov. Je la nomo de la E-societo „N. J. Vapcarov“ parolis Radka Pravĉanska. La ĉeestantoj kun granda intereso kaj kontento aŭskultis la elkorajn kaj belajn parolojn de la gastoj. Prof. Podkaminer esprimis sian kontenton de la gastama akcepto kaj ekdeziris novajn sukcesojn en la batalo por paco kaj amikeco inter la popoloj.

Tomaŝ Balda esprimis deziron ke estonte oni starigu pli intimajn kamaradecajn ligojn inter lia urbo kaj Mezdra.

Ni, la esperantistoj el Mezdra, memoros longe tiun renkontiĝon kaj ni pritaksas ĝin kiel agnoskon de nia modesta agado, kaj pro tio ankaŭ estonte ni laboros ĉiam tiel abnegacie.

Anĉo Anĉev Veselin Dimitrov



La gastoj inter la esperantistoj en Mezdra

UNUA LANDA KONFERENCO

La 4-an de julio 1967 en Sofio okazis la unua nacia konferenco de la instruistoj, kiuj instruas Esperanton en la bulgaraj lernejoj. Post la malfermo de la konferenco faris prelegojn k-do B. Simeonov je temo: „La nuntempa instruado de Esperanto en la bulgaraj lernejoj kaj entreprenoj pri ĝia plibonigo“ kaj de k-do Š. Bočev — „Pri la organiza stato de la instruista sekcio“.



La prezidantaro de la konferenco

Ĉeestis pli ol 60 instruistoj reprezentantoj de distriktoj el la tuta lando. Multaj el ili faris interesajn eldirojn. Kelkaj de ili montris siajn eksperimentojn.

Profesoro St. Ĝuĝev, regula membro de la Internacia Esperanta Akademio, pritraktis la problemon de la instruado de Esperanto kaj substrekis ĝian signifon por la patriotisma kaj internacieca edukado de la junuloj.

Malgraŭ la malfacilaĵoj, kiujn la in-

struistoj renkontas, en sia laboro ili kun la konata idealismo de instruisto sukcese instruas la lingvon al pli ol 3000 ĝelernantoj de la diversaj lernejoj, teknikumoj kaj universitatoj. En kelkaj Domoj de la Kulturo en Sofio, Ruse, Vraca kaj alie oni fondis klubojn de instruistoj-esperantistoj por disvolviĝo de la kultura kaj profesia majstreco de la instruistoj tiel necesa por la plibonigo de la pedagogia kvalifikado kaj la pedagogia laboro kun la junuloj.

Malgraŭ la atingitaj sukcesoj estas necesa pli granda pedagogia sperto kaj ŝanĝo kaj disvastigo de la instruista majstreco.

Nesufiĉe oni utiligas la instrukcion de la Ministerio de popola klerigo kaj la aprobitan programon de 1964 jaro.

Oni faris proponon ke la Ministerio enkonduku fakultative la instruadon de Esperanto en politeknikaj Institutoj kaj filologiaj fakultatoj. Tiamaniere Esperanto povus esti studata kiel dua aŭ tria specialeco post farita ekzameno en la katedro de Esperanto ĉe la Sofia Ŝtata universitato.

Oni faris proponon al la Ministerio kaj la Distriktaj fakoj de klerigo ke ili planu en la programo ankaŭ la studadon de Esperanto, se estas spertaj instruistoj.

Estas dezirinde ke la instruistaj grupoj aŭ apartaj esperantistoj organizu en la profesiaj kluboj kaj Domoj kursojn por studado de Esperanto.

Esperanto kontribuas multon por la patriotisma kaj internacieca edukado, kiel ankaŭ por la solvo de la plej grava problemo de nia socialisma lernejo — la komunisma edukado de la junularo.

Cv. Petrova



LA ERAROJ EN NIA SPIRADO KAJ TIES MALUTILAJ SEKVOJ EN NIA SANSTATO

La spirado estas funkcio de nia vivo, al kiu nur tre malmultaj homoj dediĉas sufiĉan atenton. De generacio al generacio la homo malĝuste spiras. Kiel tre juna infano la homo instinkte spiras laŭ la ĝusta maniero. Tio estas science pruvita. Sed sekve de nia kontraŭnatura rapidega, nervostreĉa vivmaniero ni kutimiĝis al tute ne bona spirado. Multaj infanoj sidas sur la lernejoj benkoj kun kurbigitaj dorsoj; kontoraj oficistoj plej ofte sidas dum tutaj tagoj, klinante sin super sia laboro. Ankaŭ la multa fumado malbone influas nian sanon, kaj pro tio ankaŭ la intelekto iom malklariĝas.

Ni scias, ke estas tre malfacile ŝanĝi malbonan kutimon, sed tamen la plenkreskulo devas fari konscie, kion faras la infano nekonscie. Multaj homoj ne havas sufiĉan energion por ŝanĝi sian malĝustan spiradon kaj sekve de tio en sia maljuna aĝo ili spertos ĉiajn malsanojn, kiuj avertas ilin, ke ili ne sufiĉe bone zorgis pri si dum la junaeco. Krom aliaj faktoroj ankaŭ la nenormala spirado estas kulpa pri tio.

La unua eraro, kiun ni faras dum la spirado, estas, ke la homo enspiras tro malmulte da aero, nome dum ĉiu spiro duonan litron, kvankam la tuta pulma kapacito estas meze 4 litroj.

La dua granda eraro estas, ke plej multaj homoj spiras per la brusto dum ili devas fari tion per la ventro. Tro malvastaj vestaĵoj estas ofte la kaŭzo, sed en la lasta tempo okazis plibonigado.

La ĉefa spirmuskolo estas la diafragmo, kaj ne la brustmuskoloj; ĉi tiuj nur helpas la spiradon. Ĉar plej multaj homoj ne uzas la diafragman muskolon, ĉi tiu tute rigidigis. Pro tio la pulmoj ne povas etendiĝi malsupren kaj tial

oni utiligas por la spirado nur la pli-grandigon de la toraka kavo per la suprenigo de la ripoj pere de la brustmuskoloj. Tiel la ventraj muskoloj, kiuj ne estas uzataj, malfortiĝas, kaj pro tio la organoj en la ventro ne povas resti en sia loko. Tio kaŭzas seriozajn komplikadojn, interalie nesufiĉan funkciadon de la glandoj.

Dum ĝusta spirado la muskoloj de la ventro daŭre laboras. La sekvo estas, ke tiuj muskoloj ne nur fortiĝas, sed ankaŭ daŭre masaĝas la intestojn, kio malhelpas obstrukcon.

Kiam per pli profunda spirado pli-grandigigas la kvanto de la enspirita aero, la sango pli bone puriĝas, t. e. enprenas pli da oksigeno kaj forigas pli da karbonacido. Per tio pli da restaĵoj foriras, kio tre favoras la sanon. Ĉe neĉufiĉa spirado tiuj restaĵoj postrestas en la korpo, kaj se la kvanto ĉiutage pligrandiĝas, la homo fariĝas iom post iom pli dika. Tio ne estas signo de saneco. Dum la maljuniĝado tiuj restaĵoj kaŭzas multajn malsanojn.

Ĝusta spirado estas do treege grava, same kiel bona dieto, kaj ankaŭ konstruaj kaj amplenaj pensoj akcelas la resaniĝon. Sed . . . oni nepre ne devas memstare eksperimentadi por pli bona spirado, kio povas kaŭzi malbonajn sekvojn. La tekniko de la spirado estas tre delikata afero. Nur fakulo povas helpi tiurilate.

El „La Praktiko“ — 1961/5
Ih. A. Mollinger

*

„La homoj, kiuj signifis ion en la mondo, estis ĉiam tiuj, kiuj ne forgesis atenti pri sia spirado.“

Charles Péguy
(franca poeto, 1872—1914)

PRI LA TEMPO KAJ LA HOMO

„La tempo estas oro, la tempo estas mono, sed estas ĝi fluganta, ho gardu ĝin vi bone!“

Tiel oni parolis en la antikva kanto.

Ho, se la tempo estus oro, arĝen o, mono aŭ belegaj perloj, tiam ĉio, kio nin ligas kun ĝi, estus simpla kaj komprenebla por la homoj. Tamen io pli malsimpla estas la tempo — tiu senfina rivero, kiu fluas senĉese ien kaj neniun scias kien kaj kial ĝi rapidas. La homaj sentoj, la homa penso estas malapabla kapti la tempon. La fakto, ke la tempo fluas tute nedepende de ni, faras nin damaĝaj en nia senpoveco antaŭ ĝi. Sed la homo estas tre fiero, li volas, ke ĉio estu sub lia regado, li ne povas rezigni la penson, ke la tempo de lia ekzisto en tiu ĉi mondo estas difinita kaj havas finon. Pro tio li serĉas manierojn kaj ilojn plene ĝin travivi. Li deziras kaj esperas krei ion grandan kaj veran kio restos post lia morto.

La tempo estas nia amiko, ĉar ĝi kuracas la vundojn, kiujn la vivo al ni kaŭzas. Ĝi estas plej certa ilo por kompreni, ĉu niaj agoj estas veraj aŭ ne, ĝi

helpas nin forgesi malbonaĵojn kaj memori agrablaĵojn, kiujn ni travivis. Sed la tempo povas esti ankaŭ malica — ĝi kruele venĝas al la homoj, kiuj ne ŝparas ĝin.

Kion ni scias pri la tempo nun? Ĉu la tempo havas ian celon kaj se jes, kia ĝi estas? De kie ĝi venas, kien iras kaj kial ni povas neniam ĉesigi ĝin? La homo vere estos firma kaj potenca tiam kiam li sukcesos venki kaj posedi la tempo. Ĉu tio estas do ebla? Ho, se la homo povus diri: „Aŭskultu min, tempo, revenu nun, donu al mi la infanecon, ne prenu mian junecon, mi deziras ankoraŭ foje travivi ilin!“ Aŭ se ni povus kiel Faŭsto krei al ĉiu bela momento: „Haltu, atendu, tiel ĉarma vi estas!“ kaj se la tempo aŭdos niajn vortojn kaj ni restos tiaj, kiaj jam ni estis, sed pli saĝaj, pli spertaj. . . . Verŝajne, la homoj tiam estus pli feliĉaj. Kiu scias!

Penka Petrova
studentino de fiziko

RENKONTIĜO DE GEESPERANTISTOJ

La 25-an de junio en Sviŝtov devis okazi la renkontiĝo de la geesperantistoj el la bulgaraj apuddanubaj urboj. Tamen venis nur la gekamaradoj el Ruse. Estas vere, ke je la 1—2-a de majo ni ne povis organizi la planitan renkontiĝon, kaj ni petas pardonon de ĉiuj gesamideanoj el la apuddanubaj urboj pri tio. Sed la kulpo ne estis nia. Kvankam ni ege deziris ni ne povis realigi la renkontiĝon, ĉar oni sciigis al ni tre malfrue, ke ni estos dommaŝtoj kaj la tempo por anticipa preparlaboro ne sufiĉis.

Pro tio ni sukcesis organizi la renkontiĝon je la 25-a de junio, paralele

kun la solenaĵoj okaze de la 90-a datreveno de la trapaso de la rusa armeo tra Danubo kaj la liberigo de Sviŝtov.

Matene ni partoprenis en la ĉefaj solenaĵoj kaj posttagmeze ni kunvenis. Pri la agado kaj la sperto de siaj societoj parolis: C. Kolarov — Sviŝtov; Ĥr. Ĥristov — Ruse kaj hazarde partoprenintaj en la E-kunveno k-doĵ Dimitr Ivanov el Karlovo kaj Radoslav Triĉkov el Vraca. Post la diskutoj ni kune vizitis la Domo-Muzeon de la fama bulgara verkisto Aleko Konstantinov.

Coĉo Kolarov



Laŭ skriboj en revuoj kaj gazetoj komencsignojn de E-movado en Ruse ni trovis ĉirkaŭ 1890 jaro, kiam estis fondita la unua E-societo sub titolo „Frateco“. Oni aludas la nomon de Tenekeĝiev. Kiuj estis, tamen, la fondintoj de tiu societo kaj kiuj estis la aliaj esperantistoj tiutempe en la urbo, kian poresperantan laboron ili faris, ne estas sciata.

De 1898 ĝis 1902 en Ruse estis eldonita monata bulgara lingva revuo „Svjat“ („Mondo“) sub la redaktado de Atanas Dimitrov. La revuo aperis en Ruse ĝis numero 6, jaro tria. La sekvantajn numerojn oni eldonis en Sofio (eldonanto Atanas Dimitrov kaj redaktoro Nikoĉa Kovaĉev). Preskaŭ en ĉiu numero de la revuo estis rubriko pri Esperanto aŭ en Esperanto kun informoj pri E-movado en la mondo.

En „Esperanto“ — internacia ĵurnalo por komerco, industrio kaj eksporto — bulgara eldono, jaro III, № 46/1907 j., redaktoro Nikola Kovaĉev, Sofio, en la rubriko „Disvolviĝo de Esperanto en Bulgario“, ni legas:

„1901 j. 15. II. fondiĝis en Plovdiv la unua E-klubo „Stelo“. La saman jaron, laŭ iniciato de Nikola Kovaĉev, en Ruse estis kreita esperantista grupo.

En 1901 j. kiel gimnazia lernanto en Ruse komencis lerni Esperanton Dimitr Malĉev. La nomojn de la aliaj esperantistoj en la urbo Malĉev ne rememoras, ĉar ili estis pli aĝaj kaj li ne laboris kun ili.

La saman jaron 1901 kiel lernantoj en la gimnazio lernis Esperanton ankaŭ niaj samideanoj Ĥr. Stamboliev, Tod. Gajdarov kaj Stefan Uzunov — estontaj gvidantoj de E-movado en Ruse.

En la komenco de 1903 j. laŭ iniciato de Ĥristo Totev, estis fondita en Ruse E-societo „Fajrero“ „celanta en estonto fariĝi „Fajrego“. La novefondita societo komencas aktivan laboron por disvastigo de Esperanto en la urbo.

Verŝajne tiu societo ekzistis tre mallongan tempon, ĉar en 1907 j. estis fondita nova E-societo „Espero“ kun prezidanto Todor Gajdarov, kiu la saman jaron partoprenis la unuan nacian E-kongreson en V. Târnovo kiel reprezentanto de „Espero“.

Du jaroj pli malfrue, en 1909 j., en Ruse okazis la III-a kongreso de la Bulgara Esperantista Ligo. Kiel prezidanto de la kongreso estis elektita la rusa esperantisto Evstifejev. Prezidanto de la ligo estis Ilia Silvestriev kaj sekretario Ksenofont Jankov. Sidejo de la ligo — Ŝumen.

Post la kongreso en Ruse komenciĝas vigla poresperanta laboro. Oni malfermas kelkajn kursojn kun pli ol 300 gekursanoj.

Baldaŭ estis fondita nova E-societo, ĉar en № 7 de aprilo 1911 j. de la komuna bulgara-rumana E-organo „Danubo“ ni legas, ke en Ruse ekzistas du esperantaj societoj: „Espero“ kaj „Frateco“, kiuj ne estis en amikaj interrilatoj. Estraranoj de „Espero“ estis P. Spasov, St. Uzunov, Tod. Gajdarov, Dojĉo Kolev k. a. kaj de „Frateco“ — Iv. Terekiev, Iv. Ĉakârov, P. Ŝivarov k. a.

En 1912 j. revenas el eksterlando Ĥr. Stamboliev, kiu komencas aktive labori por Esperanto.



Jarkunveno de E-societo „Libero“ en Ruse

La saman jaron venas en Ruse ankaŭ Dim. Malĉev, eksredaktoro de E-gazeto „Semo“.

En aprilo 1912 j. granda grupo de rumanaj esperantistoj gastas en Ruse. En junio geesperantistoj el Ruse vizitas Bukureŝton kiel gastoj de siaj rumanaj amikoj.



Lernantoj-esperantistoj en lernejo
„V. Levski“ en Ruse

En la sama jaro la du E-societoj „Espero“ kaj „Frateco“ interkonsentas labori kune sub la gvidado de speciala urba E-komitato.

En tiu tempo Dim. Malĉev komencis eldoni semajnan E-revuon „Kulturo“.

Malĉev intencis eldoni ĉiutagan E-gazeton sub titolo „Telegramo“ „la unua provo en la mondo por ĉiutaga E-ĵurnalo“ — kiel li mem diras. Lia intenco, tamen, ne efektiviĝis, ĉar li estis oficiĝita kiel teknikisto en Silistra, kie ne estis presejo kun esperantaj literoj.

Dum la milito 1912—1913 kaj 1915—1918 jaroj en Ruse ĉesas ĉia E-agado.

Post la fino de l' milito en 1919 j. en Ruse enlokiĝis subkolonelo Ilia Silvestriev el Ŝumen. Ĉi tie Silvestriev fondis „Lokan Propagandan Komitaton „Frateco“, kies prezidanto estis li mem.

Silvestriev malfermis kaj gvidis la unuan post la milito kurson en Ruse. Tamen baldaŭ li translokiĝis en Ŝumen. Post lia forveturo la kurson gvidis Stamboliev.

En 1920 j. kursojn gvidis Klara Kalenska kaj Vladimir Georgiev.

La saman jaron St. Uzunov, Tod. Gajdarov, Vl. Georgiev, Iv. Grozev, Iv. Kovaĉev, Dim. Ivanov, Iv. Josifov, Kl. Kalenska k. a. renovigis la malnovan E-societon „Espero“ kun prezidanto St. Uzunov kaj sekretario Vl. Georgiev.

Larenovigita societo komencis viglan laboron kaj malfermis kelkajn novajn kursojn.

En 1921 la tiama ministro de la popola klerigo St. Omarĉevski enkondukis Esperanton kiel fakultativa lernejobekto en la sesaj klasoj de la realaj gimnazioj. En Ruse estis oficigita fare de la Ministerio kiel lektoroj Klara Kalenska en la knabina gimnazio kaj Vladimir Georgiev en la knaba gimnazio.

En 1922 j. la societo disvolvis viglan agadon, malfermis multajn kursojn. La aŭtoritato de Esperanto kreskis. La lingvo internacia populariĝis kaj la societo okupis unu el la frontaj lokoj en la lando.

La 1923-an jaron unuaj eksterlandaj gastoj post la milito al la societo estis rumanaj esperantistoj kiuj partoprenis la nacian kongreson en V. Târnovo.

Post la kongreso en V. Târnovo granda grupo (ĉirkaŭ 80 bulgaraj geesperantistoj el diversaj urboj de la lando) kune kun siaj rumanaj gastoj vizitis la rumanan E-kongreson en Temeŝvar kaj de tie 10 esperantistoj el Ruse forveturis al Germanio por partopreni la 15-an universalan kongreson en Nürnberg.

Dum la pasko 1924 j. estis organizita distrikta E-renkonto, kiun partoprenis ankaŭ 8 gastoj el Rumanio, inter kiuj la fama hungara esperantisto Andreo Ĉe, kiu faris interesan prelegon en la urba teatro antaŭ grandamasa publiko.

En la sama jaro (27—29 de julio en Ruse okazis la XI-a nacia E-kongreso, kiun partoprenis ankaŭ Andreo Ĉe, D-ro Kenel Ĉinio, Fiŝer — vicministro de la ru



mana registaro, Tiberio Morariu, Arabaĝiu kaj multaj aliaj rumanaĝespe-
rantistoj.

Post la kongreso multaj esperantistoj el Ruse forveturis al Rumanio por partopreni la rumanan E-kongreson en Arad (Transilvanio) kaj de tie Vienon por la XVI Universala Kongreso.

Dum la vintro la saman jaron estis fondita nova E-societo „Solidareco“ de kapitano Stefan Radev, Ivan Kotov, Ivan Kovačev k. a.

1925 j. estis tre bonrezulta por la E-movado en nia urbo. La du E-societoj disvolvis vastan propagandan laboron. Oni malfermis multajn kursojn, organizis amuz-vesperojn, ekskursojn ktp.

En 1926 j. St. Uzunov kaj Vl. Georgiev komencas eldonon de E-revuo „Reklamo“.

En 1927 j. ambaŭ societoj unuiĝis. La unuiĝitaj fortoj de la esperantistoj puŝas ankoraŭ pli forte la movadon en la urbo. Ruse fariĝis centro de E-movado en Bulgario kaj en 1928 jaro la sidejo de la Centra Komitato de Bulgara Esperantista Asocio translokiĝis en Ruse.

La Centra Komitato de la Asocio konsistis de esperantistoj el Ruse kaj Ŝumen: prezidanto Il. Silvestriev el Ŝumen, vicprezidanto Iv. Kotov, sekretari-kasisto kapitano St. Radev el Ruse k. a.

La revuon „Bulgara Esperantisto“ redaktis Iv. Kotov.

En 1929 j. Belčo Oktomvriiski eldonis albumon de bulgaraj esperantistoj.

La saman jaron B. Oktomvriiski kaj Iv. Kotov fondis komercan entreprenon „Internacia Agentejo“.

La E-movado en Sofio iom stabiliziĝis kaj 16-a Nacia E-kongreso en Vidin 1929 j. decidis translokiĝi CK de BEA denove en Sofio. La redaktado de „Bulgara Esperantisto“ restis en Ruse ĝis 1930 j.

Pro la neregula eldonado de „Bulgara Esperantisto“ tamen la E-societo

en Ruse komencis en 1931 j. eldoni E-revuon „Danubo“ sub la redaktado de Vl. Georgiev.

Pro malkonsentoj inter la membroj de unuiĝita societo, la 5-an de novembro 1933 j. oni renovigis je memstara agado la societon „Espero“ kaj de tiu momento en la urbo denove komencis



La Domo de la Kulturo kaj la Monumento de la Soveta Soldato en Ruse

labori du E-societoj: „Solidareco“ kaj „Espero“.

La rilatoj inter la estraroj de ambaŭ societoj pli kaj pli malboniĝis kaj komenciĝis malinda por esperantistoj batalo, kiu tute ne estas en utilo de la E-movado en la urbo.

En 1934 j. Iv. Kotov kaj Vl. Georgiev fondis entreprenon „Turista Informa Servo“ por eksterlandanoj, kiu bone laboris ĝis la komenco de la Dua Mondmilito.

Por forigi la nedezirindan staton de la E-movado en Ruse kelkfoje CK de BEA insistis antaŭ la du societoj interkompreniĝi kaj unuiĝi. Interkonsento tamen ne estis atingita kaj la du socie-

toj daŭrigis labori aparte unu de alia ĝis 1939 j. kiam laŭ ordono de la Ministerio de la Internaj Aferoj societo „Espero“ estis devigita ĉesigi sian E-agadon kaj transdoni sian havaĵon kaj arkivon al societo „Solidareco“.

Deepost la komenco de la Dua Mond-

milito je la fino de la sama 1939. - poresperanta laboro en la urbo ĉesis ĝis 1945 j., kiam estis fondita la nuna E-societo „Libero“.

Hr. Stamboliev, Iv. Kotov,
D. Ivanov, Vl. Georgiev

LINGVAJ DEMANDOJ

PRI LA PROPONO POR „HOMO“

Kiam ni parolas pri homo, ne montante la sekson, tiam estus regule uzi la pronomon „ĝi“ (kiel ni faras ekzemple kun la vorto „infano“), kaj se vi tiel agos, vi estos gramatike tute prava. Sed ĉar la vorto „ĝi“ (uzata speciale por „bestoj“ aŭ „senvivaĵoj“) enhavas en si ion malaltigan (kaj ankaŭ kontraŭkutiman) kaj por la ideo de „homo“ ĝi estus iom malagraba, tial mi konsilus al vi *fari tiel, kiel oni faras en aliaj lingvoj, kaj uzi por „homo“ la pronomon „li“*. Nomi tion ĉi kontraŭgramatika ni ne povas; ĉar, se ni ĉiam farus diferencon inter „homo“ kaj „homino“, tiam ni devus por la unua uzi „li“, kaj por la dua — „ŝi“; sed ĉar ni silente interkonsentis, ke ĉiun fojon,

kiam ni parolas ne speciale pri sekso *virina*, ni povas uzi la viran formon por *ambaŭ* seksoj (ekzemple „homo“ = homo aŭ homino, „riĉulo“ = riĉulo aŭ riĉulino k. t. p., per tio mem ni ankaŭ interkonsentis, ke *la pronomon „li“ ni povas uzi por homo en ĉiu okazo, kiam lia sekso estas por ni indiferenta*. Se ni volus esti *pejante* gramatikaj, tiam ni devus uzi la vorton *ĝi* ne sole por „homo“, sed ankaŭ por ĉiu alia analogia vorto; ekzemple, ni devus diri: „riĉulo pensas, ke ĉio devas servi al ĝi (ĉar ni parolas ja ne sole pri riĉaj viroj, sed ankaŭ pri riĉaj virinoj. . .).

Zamenhof

(Respondo 23, La Revuo, 1907, Aŭgusto

Излязоха от печат и се доставят от Българската есперантска кооперация, бул. Витоша № 40, София, следните учебни пособия:

1. УЧЕБНИК ПО ЕСПЕРАНТО от Зора Младенова Ханс и Георги Хр Димов. Първо издание. Цена 1.20 лв.

2. УЧЕБНИК ПО ЕСПЕРАНТО от Иван Сарафов и Симеон Хесанчиев. VI стереотипно издание. Цена 0.44 лв.



DEZIRAS KORESPONDI

BRAZILLO

Joaquim Antonio Lopes, Poŝtkesto 5888, Sao Paŭlo — kun bulgaroj.

JAPANIO

a) Ni estas japanaj gelernantoj de alta lernejo, nomata Oojama Kooko, en Tokio. Ni nun eklernis Esperanton sub la gvido de s-ro F. Kido. Ni estas 15—18 jaraj. Kun fremdaj geknaboj aŭ lernejoj ni deziras interŝanĝi sonbendojn, desegnaĵojn, fotojn, gazetojn kaj aliajn.

En la venonta aŭtuno ni intencas ekspozicii Esperantaĵojn en nia lernejo. Tiam ni volas prezenti la utilecon de Esperanto kaj E-agadon de fremdaj lernejoj. Se ni povas ricevi sonbendojn, en kiuj estas registritaj E-paroladoj de geknaboj aŭ muziko kaj kantoj, aŭ la fotojn, kiuj prezentas la vivon de gelernantoj en la lernejo, aŭ aliajn interesaĵojn pri via vivo, ni estos tre feliĉaj. Al la lernejoj aŭ la personoj, kiuj sendos tiujn al ni, ni ankaŭ sendos al ili niajn sonbendojn aŭ fotojn aŭ aliajn laŭ iliaj deziroj.

La adreso de nia lernejo estas: Esperanto Klubo de Oojama Kooko, Komone 5-18-1, Itabasi, Tokio, Japanio.

b) Ni deziras korespondi kun fremdaj geamikoj, do, se vi konas iujn samajn dezirantojn en via lando, bonvole prezentu nian adreson al tiuj. Jen estas niaj adresoj:

F-ino Emiko Kawaguti, Nisi Sugamo 4-280, Tosima, Tokio.

Fi-no Sigeyo Nomura, Nisigaoka 2-10-1, Kita, Tokio.

F-ino Ĉieko Hasiba, Komone 4-11-2, Itabasi, Tokio.

Fi-no Kazue Asoo, Ooyama 34, Itabasi, Tokio.

F-ino Mitiyo Arihara, Kisi 2-7-11, Kita, Tokio.

F-ino Miyuki Enomoto, Kami Jujo 1-8-4, Kita, Tokio.

F-ino Tosiko Isogai, Tabata 275, Kita, Tokio.

F-ino Yuko Huruya, Ooyamakanai 25, Itabasi, Tokio.

F-ino Sumiko Nawai, Meziro 5-9-3, Tosima, Tokio.

F-ino Yumi Sibasaki, Narimasu 101, Itabasi, Tokio.

F-ino Eriko Kusumi, Simo Akatuka 305, Itabasi, Tokio.

F-ino Satiko Matubara, Nagasaki 5-16-13 Tosima, Tokio.

F-ino Yukiko Samezima, Mikaihara 3-6-2 ce Iida, Itabasi, Tokio.

F-ino Sumi Isihara, Kasuga 2-14-26, Nerima, Tokio.

F-ino Junko Hasegawa, Sunasinden 1529, Kawagoe, Saitama.

S-ro Makoto Suzuki, Hiyoci 181, Tokorozawa, Saitama.

S-ro Kenji Sugisaki, Oojihon 3-1-1, Kita, Tokio.

S-ro Hideo Sugiyama, Kamiya 3-38, Kita, Tokio.

S-ro Naosi Wada, Sakuradai 1-26, Nerima, Tokio.

F-ino Kazue Nokajima, Mejiro 5-22-8, Tosima Tokio.

F-ino Yukie Hirano, Nisigaoka 2-5-23, Kita, Tokio.

Fino Eiko Suzuki, Minami Nagasaki 1-17-2, Tosima, Tokio.

F-ino Nanae Kimura, Sengoku 1-27-11, Bunkyo, Tokio.

S-ro Kiyosi Miyazaki, Simura 3-6-7, Itabasi, Tokio.

c) Mi deziras korespondi kun multaj fremdaj geinstruistoj pri diversaj temoj de edukado, ne nur pri E-eduko. Mia adreso estas: S-ro Fusacugu Kido (32-aĝa), Higasi Mukojima 3-16-4, Sumida, Tokio.

MAROKO

Bayod Hoceine (27-jara s-ro), 35 Face Nouvelle Mosquée, Tabriquet—Salé—dez. korespondi kun gesperantistoj el la tuta mondo pri historio, geografio, literaturo, politiko, sporto, vojaĝoj, naturo; kolektas PM, BK.

POLLANDO

Pli ol 1000 polaj gejunuloj 14—28-jaraj, partoprenintaj la kurson de Esperanto en la semajnevuo „ITD“ deziras korespondi kun la tuta mondo. La redakcio akceptas korespondpropojn kun la jenaj informoj: nomo kaj antaŭnomo, adreso, ŝatoj kaj interesiĝoj profesio aŭ studfako, aĝo. Leteron kun la ĉi-supraj informoj oni sendu al: „ITD“, Varsovio, str. Ordynacka 9, Pollando, kun kromnoto Esperanto.

USSR

Vova Kompaničenko (17-jara), Platonova 16/4, Krim, Jalta—pri PM, BK.

(Laktoprilaborado) — Smoljan

Produktado de:

Unika en la mondo speciala pikanta fromaĝo, tipo „Rodopa“, kiu estas prilaborita de bovina lakto ĉe montara klimato, abunda herbaro, kiu posedas riĉan nutraĵon kaj vitaminan enhavon.

Ĝia pikanteco provokas apetitreflekson ĉe la plej malvigla nutra sistemo. La seka materio kaj la butereco en ĝi estas de 60 ĝis 64 procentoj.

Vastan merkaton en eksterlando trovas ankaŭ la produktataj de ŝafinlakto fromaĝoj: „Kefaletiri“ kaj „Pekarino“, kiel ankaŭ la kaĉkavalo (flava fromaĝo) „Balkan“, kiuj dank' al la specialaj altmontaraj kondiĉoj estas konsiderinde pli nutraj kaj kun pli abunda vitaminenhavo. La intereso de la eksterlandaj firmoj pri ili estas eksterordinare granda.

Telefonoj: Direktoro n-ro 21-25

Librotenado n-ro 20-62

DISTRIKTA KOOPERATIVA ASOCIO EN SMOLJAN

unuigas 38 konsumkoopertivojn kun 484 magazenojn kaj 181 enterprenojn por kolektiva nutrado (restoracioj) kaj realigas 56% de la podetala komercado en la distrikto.

En siaj laŭ la naciaj tradicioj aranĝitaj restoracioj kun kampadejoj en la restadlokoj: „Smoljanski ezera“ (Lagoj de Smoljan), „Pamporovo“; „Ardâșlă“ „Ĉepelare“ kaj „Nareĉenski bani“ (Banejoj ĉe vilaĝo Nareĉen) proponas grandan elekton de specialaĵoj de Rodopi-montaro kaj altkvalitaj trinkaĵoj.

Ĝi elacetas valorajn drogherbojn, sovaĝkreskantajn fruktojn kaj fungojn, kiuj abundas en la meza parto de Rodopi-montaro.

Telefona centrejo: 29-21, 22, 23
